

BOHEMA REVUO ESPERANTISTA

kun literatura aldono

LEGOLIBRO DE BOHEMAJ ESPERANTISTOJ

Oficiala organo de bohemaj Esperantistoj kaj de
CENTRA ASOCIO
BOHEMA UNIO ESPERANTISTA (B. U. E.)

Ni laboros por Esperanto.

CENTRA ASOCIO BOHEMA UNIO ESPERANTISTA.
— SÍDLO: PRAHA I. 342. KAVÁRNA „UNION". —
KANCELÁŘ A UČEBNA: II. VODIČKOVA ULICE 38.
REDAKCE REVUE: II. DITTRICHOVA ULICE 7.

Členové klubů sdružených v „Ústředním Svazu Bohema Unio Esperantista" a těch, které za jeho součinnosti se ustavují, dostávají tuto revui za roční předplatné K 2·50 prostřednictvím pp. jednatelů.
Roč. I.—V. pro členy B. U. E. po K 2·20.

Svaz jednotlivců „Ligo de Bohemaj Esperantistoj", Klub Esp. v Praze (dříve „U Donátů") a Klub Esp. v Radvanicích dávají členům tuto revui zdarma.

1912. **SRPEN-ZÁŘÍ — AŬGUSTO-SEPTEMBRO** **VI. 7.**

Roční předplatné: 3 K. Ročník I.-V. po K 2·50. **Cena tohoto čísla s přílohou: 30 hal.**

ČASOPIS ČESKÝCH ESPERANTISTŮ
BOHEMA REVUO ESPERANTISTA

vychází 10krát ročně (kromě srpna a září). | eliras monate (krom aŭgusto kaj septembro).

Redaktor: **Ed. Kühnl.**

Předplatné (ročně **3 K** pro Rakousko, Fr. 3·75 pro cizinu), a vše týkající se časopisu, buďiž zasláno pouze na adresu: „Časopis Českých Esperantistů“, Praha II.-2023, Dittrichova ul. 7. Redakce vyhražuje si právo upraviti články pro tisk. Netištěné rukopisy se vrátí, byla-li přiložena známka; pracem původním dána přednost. Abonpago, akceptata por almenaŭ unu jaro (**Fr. 3·75** = 1·50 Sm por fremdlando, 3 K por Aŭstrio), kaj ĉio, kio koncernas la gazeton, estu sendata laŭ adreso:

„Časopis Českých Esperantistů“ en Praha II. (Bohemujo - Aŭstrio).
II.—2023. Dittrichova ul. 7.
Účet poštovní spořitelny 93.281.

*   *

Centra Asocio Bohema Unio Esperantista en Praha
nomis en la ĝenerala kunveno, okazinta la 29. junion 1912
lian Moŝton la altestimatan eksurbestron de Londono,

sir Thomas Vezey STRONG
sia HONORA MEMBRO

pro liaj eminentaj meritoj pri la esperanta movado kaj
pro lia senlaca sinofera propagando celanta proksimigon
de la nacioj sur la kampo de komuna laboro kultura,
precipe konsiderinte liajn multvalorajn servojn
faritajn tiurilate, danke Esperanton al nia nacio bohema.

En la reĝa bohema ĉefurbo Praha, la 1. de julio 1912.

kasisto — prezidanto — sekretario
kontisto — vicprezidanto — sekretario

Centra Asocio Bohema Unio Esperantista en Praha
nomis en la ĝenerala kunveno, okazinta la 29. junion 1912
sian altestimatan prezidanton, lernejan konsilanton

sinjoron Prof. Dr. Václav Rosický
sia HONORA MEMBRO

pro liaj eminentaj meritoj pri la esperanta movado
inter Bohemoj, precipe konsiderinte la multvalorajn
servojn sindone faratajn por nia organizo.

Praha, la 1. de julio 1912.

kasisto — sekretario
kontisto — vicprezidanto — sekretario

Pinx. F. J. Havelka,
akad. malíř.

ŘEČ DR. L. L. ZAMENHOFA

při zahájení VIII. mezinárodního kongresu Esperantistů.)*

První slova, která chci dnes říci vám, drazí stoupenci, jsou slova srdečného blahopřání, neboť máme dnes velký svátek. Právě skončilo se 25 let od té doby, kdy — po dlouhých přípravách ke zrodu — objevil se veřejně jazyk, který nás všechny sjednocuje, pro který my všichni pracujeme a který vtěluje v sobě tu lidi sbratřující ideu, kterou většina z nás chová ve svém srdci a která po 25 let plamenně povzbuzovala nás ku práci, přes všelikou nesnáz a všechny překážky.

25 let práce pro Esperanto a pro jeho ideu! To mohou plně pochopiti jen ti, kteří súčastnili se té práce od počátku až dosud. Bohužel velmi malý jest počet těch osob. Z pracovníků první doby velmi mnozí již dávno nežijí, jiné unavila nesnadná, velikou trpělivost a houževnatost vyžadující cesta, a ti zmizeli z našeho sboru. Z těch, kteří nacházejí se nyní v tomto sále, ohromná většina v prvních letech Esperanta nic nevěděla o něm aneb nejasně slyšela o něm jen jako o jakési bláznivé, posměchu hodné kuriositě; velmi mnozí z vás v okamžiku objevení se Esperanta byli ještě dětmi; mnozí, a to jistě ne nejméně horliví z vás v té době ani vůbec nebyli ještě na světě. Obrovská většina z vás připojila se k naší věci teprve tenkráte, když tato byla již dosti silná a vyzkoušená. Velmi a velmi malý, snadno na prstech spočítatelný jest počet těch, kteří šli s Esperantem od okamžiku jeho zrození až po dnešní čas. Dojati mohou nyní vzpomínati, jak hrozně nesnadný byl každý krok na počátku, kdy každá zmínka o Esperantu vyžadovala zvláštní odvahy, kdy z každého tisíce semen, která jsme nejprimitivnějším způsobem, bez pomoci a bez prostředků trpělivě házeli v půdu, sotva jedno zapustilo kořeny.

25 let! Ohromnou důležitost má ta částka času v dějinách jazyka umělého. Jazyky přirozené rostou zcela klidně, poněvadž s takovým jazykem nikdo neodváží se dělati nějaké experimenty nebo ohýbati jej dle svého vkusu; ale o jazyku umělém každý se domnívá, že má právo se ozvat, že může anebo dokonce má povinnost říditi osud jazyka dle svého pochopení. V jazyku přirozeném žádný ani ten největší skutečný nedostatek nikoho nedráždí, ba ani nenutká k úvahám, a jest přijímán s úplnou spokojeností nebo resignací; v jazyku umělém všechno se nám zdá hodným kritiky, každá maličkost, která se nesrovnává s naším vkusem, bodá nás v oči a budí touhu po opravě. Jazyk umělý po dlouhý čas je vystaven neustálým větrům, neustálému cloumání. Co větrů, co ustavičného zmítání náš jazyk musel snésti během svého 25-letého trvání! Jestliže přece všechno zdravě vydržel, jestliže přese všechny větry a nárazy po 25 let žil a rostl pravidelně a přímo, stále síle a se obohacuje, nikdy se neohýbaje ani nemrzače, nikdy nehroze rozpadnouti se v dialekty, nýbrž vždy víc a více upevňuje svého zcela určitého, všude stejného ducha, nikdy neztráceje dnes, čeho nabyl včera, — můžeme si proto srdečně blahopřáti.

(Pokračování.)

---

*) *Jsme přesvědčeni, že zavděčíme se svým čtenářům souběžným překladem této řeči, který poslouží zvláště začátečníkům, aby mohli i bez učitele vniknouti do logické stavby Esperanta.*

PAROLADO DE DR. L. L. ZAMENHOF

ĉe la malfermo de la Oka Internacia Kongreso Esperantista.

La unuaj vortoj, kiujn mi volas hodiaŭ eldiri al vi, karaj samideanoj, estas vortoj de kora gratulo, ĉar ni havas hodiaŭ grandan feston. Jus finiĝis dudek kvin jaroj de la tempo, kiam — post longa naska preparado — aperis publike la lingvo, kiu nin ĉiujn unuigas, por kiu ni ĉiuj laboras kaj kiu enkorpigas en si tiun homofratigan ideon, kiun la plimulto el ni havas en sia koro kaj kiu dum dudek kvin jaroj flame instigadis nin labori, malgraŭ ĉia malfacileco kaj ĉiuj malhelpoj.

Dudek kvin jaroj da laborado por Esperanto kaj por ĝia ideo! Tion povas plene kompreni nur tiuj personoj, kiuj partoprenis en tiu laborado de la komenco ĝis nun. Bedaŭrinde tre nemultaj estas tiuj personoj. El la laborantoj de la unua tempo tre multaj jam delonge plu ne vivas, aliajn lacigis la malfacila, grandan paciencon kaj persistecon postulanta vojo, kaj ili malaperis el nia anaro. El tiuj personoj kiuj troviĝas nun en ĉi tiu ĉambrego, la grandega plimulto en la unuaj jaroj de Esperanto nenion sciis pri ĝi aŭ neklare aŭdis pri ĝi nur kiel pri la freneza, mokinda kuriozaĵo; tre multaj el vi en la momento de la apero de Esperanto estis ankoraŭ infanoj; multaj, kaj certe ne la malplej fervoraj el vi, en tiu tempo eĉ tute ne ekzistis ankoraŭ en la mondo. La grandega plimulto el vi aliĝis al nia afero nur tiam, kiam ĝi estis jam sufiĉe forta kaj elprovita. Tre kaj tre malgranda, facile kalkulebla per la fingroj, estas la nombro de tiuj personoj, kiuj iris kun Esperanto de la momento de ĝia naskiĝo ĝis la nuna tempo. Kortuŝite ili povas nun rememori, kiel terure malfacila estis ĉiu paŝo en la komenco, kiam ĉiu aludo pri Esperanto postulis specialan kuraĝon, kiam el ĉiu milo da semoj, kiujn ni en plej primitiva maniero, sen helpo kaj sen rimedoj pacience jetadis en la teron, apenaŭ unu ricevis radikojn.

Dudek kvin jaroj! grandegan gravecon havas tia peco da tempo en la historio de lingvo artefarita. Lingvoj naturaj kreskas tute trankvile, ĉar kun tia lingvo neniu kuraĝas fari iajn eksperimentojn aŭ fleksi ĝin laŭ sia gusto; sed pri lingvo artefarita ĉiu opinias, ke li havas rajton de voĉo, ke li povas aŭ eĉ devas direkti la sorton de la lingvo laŭ sia kompreno. En lingvo natura ĉiu eĉ plej granda efektiva malbonaĵo neniun incitas, eĉ neniun meditigas, kaj estas akceptata kun plena kontenteco aŭ rezignacio; en lingvo artefarita ĉio ŝajnas al ni kritikinda, ĉiu bagatelo, kiu ne estas konforma al nia gusto, pikas al ni la okulojn kaj vekas deziron de refarado. Lingvo artefarita dum longa tempo estas elmetata al senĉesaj ventoj, al senĉesa tirado kaj puŝado. Kiom da ventoj, kiom da senĉesa tirado nia lingvo devis suferi dum sia dudekkvinjara vivo! Se ĝi tamen ĉion sane eltenis, se malgraŭ ĉiuj ventoj kaj puŝoj ĝi dum dudek kvin jaroj vivis kaj kreskis regule kaj rekte, ĉiam pli fortiĝante kaj riĉiĝante, neniam fleksiĝante aŭ kripliĝante, neniam minacante disfali en dialektojn, sed ĉiam pli kaj pli fortikigante sian tute difinitan, ĉie egalan spiriton, neniam perdante hodiaŭ, kion ĝi akiris hieraŭ, — ni povas pri tio sincere nin gratuli.

(*Daŭrigo.*)

VIII. KONGRES ESPERANTISTŮ V KRAKOVĚ
(11.—18. srpna 1912).

Letošní kongres byl svolán do Krakova, staroslavného sídla polských králů. Tím zároveň oslaveno 25leté jubileum Esperanta, jehož autorem jest Polák — Dr. Zamenhof, sídlící nyní ve Varšavě. (Z jasných důvodů nebylo lze svolati takovouto manifestaci do Ruska.) Kongres navštívený téměř tisícem hostů byl vskutku jubilejní a uspokojil svými výsledky.

Organisace sjezdu byla vzorně provedena za předsednictví universitního professora O. Bujwida a za součinnosti mnoha ochotných přátel krakovských, jimž byl vždy nepostrádatelnou podporou Dr. Rosenstock, jednatel přípravného výboru. Projevy úplné spokojenosti nad zdarem těchto prací a uznání zasloužilým pracovníkům vyslovili mnozí účastníci v knize přání, která byla v „akceptejo“ každému přístupnou; leč nikdo nenalezl příčin ke steskům. Značného ulehčení v ubytování všech hostí dosaženo zařízením stálé ubytovací kanceláře na nádraží, kde i v noci byly udíleny informace přijíždějícím z ciziny. Zvláštní zmínky zaslouží i kongresní poštovní úřad, který byl ředitelstvím pošty zřízen v bezprostřední blízkosti „akceptejo“ a kde stále alespoň dva úředníci-Esperantisté (ze 7 úředníků znalých Esperanta) byli přítomni. Tato esperantská filiálka expedovala v prvních třech dnech dvacet tisíc zásilek! Hojnou měrou používali kongresisté také práva k bezplatné jízdě na elektrické dráze po dobu sjezdu.

Akceptejo — přijímací kancelář byla umístěna v budově Obchodní akademie, kde byly i místnosti směnárny, prodejna, buffet, výstava, písárna, sekretariát sjezdu a místnosti pro schůze U. E. A. i odborové. Hlavních pět schůzí společných, ples a jubilejní slavnost byly pořádány ve Starém divadle.

V pátek byla otevřena přijímací kancelář; téhož dne zavítal již do Krakova Dr. Zamenhof s rodinou. V sobotu do pozdních hodin večerních a v neděli dopoledne přijížděli každým vlakem přečetní hosté, kteří vnesli rušný život do všech ulic krakovských. V neděli dopoledne po schůzkách některých účastníků podle národností pořádán městskou radou banket pro pozvané hosty, jehož se súčastnilo na 100 osob. Na uvítací pozdrav přednesený náměstkem starosty poděkovali pozvaní zástupci předních korporací esperantských jménem svých zemí; za Čechy pronesl zdravici Ed. Kühnl, zmíniv se o současném jubileu Esperanta v Čechách, kde před 10 roky byl založen první klub. — Odpoledne naplnil se do

posledního místa slavnostní sál Starého divadla, kde officielně zahájen kongres pozdravy zástupců jednotlivých národností a obvyklou řečí Dr. Zamenhofa, která jest vždy s napětím a s největším zájmem vyslechnuta. Zástupce Stálého kongresního výboru prof. Bourlet otevřel schůzi, vzpomenuv zesnulého předsedy posledního sjezdu Van der Biest-Andelhofa. Do předsednictva byli zvoleni: Dr. Mikolajski (předseda), Chavet, Rudnicki, Dr. Rosenstock a Bolinbroke Mudie (Angličan), Rollet de l'Isle (Francouz), Behrendt (Němec), Grabowski (Polák) a Nedošivin (Rus). Po pozdravu předsedově proslovil významnou řeč náměstek starosty Dr. Szarski (polsky a v Esperantu), v níž poukázal na význam Esperanta pro národ polský. Stejně vřele byla přijata i řeč předsedy krakovské Obchodní komory a sekretáře Obchodní a průmyslové komory. Poslední ujal se slova univ. prof. Bujvid, aby promluvil o vnitřní idei Esperanta a o našich cílech; poděkoval zástupcům městských korporací a tisku za podpory a zájem, který dali na jevo svou účastí. Za hlučného provolávání slávy povstal Dr. Zamenhof, aby pronesl svou — jak pravil — poslední řeč kongresní, v níž zdůraznil též skromnou žádost, aby byl považován mezi všemi Esperantisty za pouhého bojovníka v řadách ostatních průkopníků, nikoli však za „Mistra", který titul mu jako autorovi jazyka byl dosud všemi stoupenci Esperanta udílen. (Viz text této řeči a překlad na jiném místě Č. Č. E.). Že toto rozhodnutí jest pevné, dokázal již v příštích schůzích, kdy vmísil se mezi účastníky, aniž by vstoupil na estrádu.

Po dlouhotrvajícím potlesku přečetl sekretář kongresu nekonečnou řadu telegramů, které došly ze všech zemí světa, nevyjímaje ani Šanghaj. S nadšením přijaty vzpomínky zaslané generálem Sebertem a rektorem Boiracem, kteří pro nemoc nemohli se tentokráte sjezdu súčastniti. Ve druhé schůzi byla přečtena odpověď na holdovací telegram zaslaný rakouskému císaři.

Ke sjezdu vyslali své zástupce: rak.-uh. ministerstvo války, uherské ministerstvo obchodu, rak. ministerstvo zeměbrany, bulharské ministerstvo vyučování, uherské ministerstvo vyučování, rumunské ministerstvo zemědělství a ředitelství statistiky, magistrát, obchodní komora a policejní správa v Galatzu v Rumunsku, universita v Krakově, krakovský svaz pro povznesení návštěvy cizinců, městské rady ve Vratislavi a v Praze a Národní Rada Česká.

Téměř všichni zástupci pronesli své zdravice Esperantem a nebylo lze poznati nějakého rozdílu v jejich výslovnosti (jest jen litovati, že přízvuk v řeči delegáta posledních dvou jmenovaných korporací, ačkoliv neobsahovala více než několik slov, nebyl bezvadný). Za přítomné Esperantisty, kteří sešli se ze třiceti jazy-

kově různých zemí, promluvila řada zástupců (za Čechy Dr. Schulhof z Pardubic), kteří vesměs referovali o uspokojivém pokroku propagandy Esperanta ve svých zemích. Mezi mluvčími byli i zástupci Indie, Japonska a Mexika. Delegát rumunských Esperantistů (slepec) podal po svém proslovu Dr. Zamenhofovi dar zaslaný rumunskou královnou Carmen Sylvou — její podobiznu s vlastnoručním věnováním a podpisem. Kongres zaslal královně děkovný telegram za její pozornost a za sympatie Esperantu.

V pondělí byly zahájeny první pracovní schůze v odborech, odpoledne pak pořádána hromadná schůze, na níž přijat nově vypracovaný řád sjezdový, předložený výborem „Konstanta Kongresa Komitato". Jednání o poplatcích, které, jak známo. měly býti za delegáty opravněné k hlasování zaslány ústředí „Centra Oficejo" v Paříži, skončilo nad očekávání hladce; protože přemnohé spolky nepovažovaly tuto otázku za dosti projednanou, jmenovitě anglické, mnohé francouzské a i německé, a dosud nevyslovily souhlas s placením příspěvků, bylo navrženo, aby tentokráte bylo uděleno právo hlasovací všem bez výjimky. Návrh byl jednohlasně přijat a po té prof. Bourlet široce objasnil stanovisko organisační a sdělil s účastníky potěšující zprávu o velkomyslném daru, který světu esperantskému věnoval general Sebert. Týž prohlásil, že jím založená a dosud z valné části vydržovaná ústřední kancelář „Centra Oficejo" v Paříži bude od 1. ledna 1913 věnována bez jakýchkoliv závazků organisovaným Esperantistům a bude na dále pod jejich správou a dohledem. Stane se sídlem výborů „Lingva Komitato", „Konstanta Kongresa Komitato," Archivu, „Oficiala Gazeto" a „Administra Komitato," který bude volen národními svazy a jehož jednatelem jmenován G. Chavet. Ve své řeči načrtl prof. Bourlet rozpočet, podle něhož počítá se s vydržováním pařížského ústředí takto: příspěvky 30 tisíc organisovaných Esperantistů po 10 ctm. (hal.): 3.000 Fr., předplatné za 2.000 ex. „Oficiala Gazeto" 10.000 Fr., celkem 13.000 Fr. Tento obnos jest nutno sebrati ke hražení nájemného, tisku a rozesílání časopisu, služného a různých vydání. (Pokladna kongresní jest vedena nezávisle od těchto položek.) Vydávání „Tutmonda Jarlibro", brožur a bibliografických spisů, tedy část neoficielní, bude i na dále podporováno gen. Sebertem. — Toto objasnění celé otázky bylo přijato za všeobecného souhlasu a jednohlasně usneseno vysloviti gen. Sebertovi officielně dík celého kongresu.

Ve druhé schůzi, ve středu, byly předneseny zprávy „Lingva Komitato", „Centra Oficejo" a „Administra Komitato", které byly jednohlasně schváleny. Jménem komise, která měla podle usnesení posledního sjezdu studovati otázku organisace, promluvil Rollet

de l'Isle, v. Frenckell a Dr. Kandt a odůvodnili, proč jejich práce nemohla býti dosud předložena letošnímu sjezdu. Vzhledem k mnohým, dosud nedosti jasným zásadním bodům této otázky bylo rozhodnuto odložiti jednání na příští kongres. V páteční schůzi pak přijat návrh německých Esperantistů, aby komise i na dále pracovala na vytčeném úkolu a aby v čas podala 9. Kongresu zprávu o svých zkušenostech, s ohledem na příští činnost „Centra Oficejo". V této poslední schůzi bylo rovněž rokováno o místě příštího sjezdu a mezi několika došlými pozvánkami (od městské rady vratislavské a bukurešťské, z Bernu, Janova, Edinburgu, San Franciska, Kodaně a Sofie) zvolen Janov v Italii. Zástupce italských Esperantistů dr. Stromboli již během tohoto sjezdu zaznamenal přes sto přihlášek účastníků ke kongresu janovskému. Zpráva, která se vyskytla i v českých listech, jakoby příští sjezd měl býti manifestací té neb oné strany politické či náboženské (Volné Myšlénky), zakládá se na naprosté nepravdě, neboť o tom nebylo ani mluveno ba ani řád kongresní by toho nepřipouštěl. Povrchní zpravodajové (nepřítomní!) však odvážili se (snad úmyslně) předložiti tuto absurdnost svým čtenářům! — V Bernu bude příštího roku uspořádána předkongresní schůze pro ty, kteří pojedou do Janova od severu a od západu. Vzhledem k pracem, které bude nutno vykonati ke kongresu X., který bylo navrženo svolati do Paříže, usneseno definitivně návrh ten přijati a již nyní pracovati na přípravách. Pro příští sjezdy pak zaznamenány pozvánky z měst výše jmenovaných a ty budou na prvém místě vzaty v úvahu. — Po zprávě o Michelinově daru (viz minulá čísla časopisu) a několika zprávách podřízenějšího významu skončena poslední pracovní schůze. V závěrečné schůzi v neděli odpoledne promluvil dr. Zamenhof o právě zesnulém autoru Volapüku M. Schleyerovi a vřelými slovy ocenil jeho práci, která, ač bez úspěchu, přec trvale zapsala jméno Schleyerovo do historie lidstva. Po té podal stručnou zprávu o své cestě z Paříže na kongres vykonané pěšky společně s J. Romanovem (Turkem), M. Devjatnin (Rus); navštívili na 200 měst a míst, v nichž téměř vždy setkali se s Esperantisty. V závěrečné řeči podal pak předseda kongresu resumé vykonané práce a vyslovil dík všem činitelům, kteří přispěli ke zdaru sjezdu. Poslední promluvil Dr. Zamenhof, který mimo jiné naznačil, že nastane po tomto jubilejním kongrese nová epocha v rozvoji Esperanta a zakončil sjezd. Po zapění hymny rozcházeli se účastníci této nezapomenutelné manifestace. — Celá řada odborných schůzí (45) a několik esperantských zábav, divadelních představení, přednášek, výstav a vycházek bylo aranžováno během tohoto týdne.

(*Pokračování.*)

LA HUNDO.

Laŭ angla poemo de Spencer skribis
Dr. Stanislav Schulhof, Pardubice (Bohemujo).

La voĉ' de korno jam eksonis
kaj tag' ekbrilis maja,
kaŝejon sian tuj forlasas
ĉashundoj, aro gaja.

Kaj korno ĉiam laŭte sonas
en hor' matena bela — — —
Ho, kie restis mia Ĝelert
la hundo plej fidela?

Ĉu kornon mian ĝi ne aŭdis
de l' raso nobla floro?
Ho, kie restis Ĝelert mia
en tiu matenhoro?

Malgaja estis la sinjoro —
en koro granda vundo.
Ne havis celon la ĉasado
sen nobla, bela hundo.

De ĉaso hejmen ĉagrenplena
reiris baldaŭ lordo,
sed, jen! La bona, bela besto
jam staris ĉe la pordo.

Sed stranga estis la aspekto,
terur' lin mem ekskuis.
La hundo tute disŝirita
kaj sang' el vundoj fluis.

La lordo staris kiel ŝtono
kaj lia korpo tremis;
la hundo lekis liajn manojn
kaj korpenetre ĝemis.

Ĉirkaŭe lordo ekrigardas — —
sed ĉie sangmakuloj,
postsignoj ĉie ruĝesangaj
aperas al okuloj.

Ho, lit' de l' filo renversita,
malordo en salono!
Kaj ĉie sangaj koaguloj
de planko ĝis plafono.

Ho, kie estas filo mia,
terure krias lordo,
sed lia krio senresponda —
ĉirkaŭe nur malordo.

Ho, monstro tiu lin manĝegis —
jen, kial la rigardo!
Kaj tuj li koron de la hundo
trapikas per ponardo.

La hund' ektremis kaj el brusto
eliris ĝemo forta — —
kaj al piedoj plej amataj
la hundo falis — — morta

La ĝem' de l' hundo vekis domon.
Servistoj, ĉambelano.
Ĉu estas io pli agrabla
ol voĉo de l' infano?

De lito, el sub kusenegoj
sub kiuj ĝi sin kaŝis,
infano ĵus la patron vokas,
al lito kiu paŝis.

Ne gravaj estas ĝiaj vundoj,
nur iom da ekscito,
sed dismordita granda lupo
mortaĉas sub la lito.

Ho, ĉio estis evidenta!
La bildo patron ravis.
La hund' disŝiris grandan lupon
kaj la infanon savis.

Ho, kiel plendis nune lordo,
sed ĉio jam sencela,
la ploron aŭdi jam ne povis
la morta hund' fidela.

En tombon ĝin apartan meti
ordonis lord' kun pento,
kaj baldaŭ super tomb' de l' hundo
eĉ staris monumento.

Kaj multa hom' en postaj tempoj
ĉe l' tombo ekgenuis,
kaj sur la humon ĝin kovrantan
eĉ larmoj ofte fluis.

„ARGUMENTOJ“ KONTRAŬ ESPERANTO.

Eltrovinto de la „tutmonda“ Volapük prelato Schleyer mortis. En la komenco oni faradis por tiu ĉi „monda“ lingvo grandan reklamon, kiu lingvo estas eble pro tio monda, ĉar neniu nacio en la mondo ĝin parolis kaj komprenis. Kiel konkuranto de Volapük aperis varsovia Hebreo Dr. Zamenhof, eltrovinto de „monda“ Esperanto, por kiu la hebreaj gazetoj faras nun grandan reklamon. La eltrovinto de Volapük ĵus mortis en Constanz 81-jara. La konkuranto de Volapük konsistas ekskluzive el vortoj romanaj kaj germanaj — 80. La malgrandaj nacioj pekas kontraŭ sia lingvo, lernante Esperanton, kiu estas tial monda, ĉar neniu ĝin sur la tuta mondo komprenas. Ĝi estas grandega lukso kaj simiumado laŭ la grandaj nacioj.

„Reichspost“ pri Volapük. Problemo de artefarita, kiel eble plej simpligita, laŭregule kombinita monda lingvo estas praantikva. Ĝi okupadis pli poste Descartes kaj Leibnitz. La nombro de la eltrovitaj lingvoj estas tre granda, sed eĉ ne unu el ili povis sin vivoteni. Oni venis al la penso, ke ĝi estas infanaĵo, oktroji al la moderna komerco kaj evoluo de la industrio novan lingvon. Dum kelka — mallonga — tempo ludis Volapük de Schleyer ian rolon, el kiu ĝin elpelis Esperanto — helpata per agitacio de la hebreaj gazetoj, kiuj ĝojis, ke unu el „unsere Leut“ elpensis novan lingvon. — Signifoplena estas, ke nek Schleyer nek Dr. Zamenhof alprenis en siajn lingvojn lingvon slavan, sed ĉiam nur la germanan, romanan kaj eĉ magiaran. Plej baldaŭ naŭziĝos al la komercaj komizoj ankaŭ tiu ĉi hebreaĵo.

Ĉe la kongreso esperantista en Kraków okazis skismo. La katolikaj Esperantistoj eniris tie en belan, de Hebreoj por ili embuske metitan kaptilon. En tiu ĉi kongreso prezentis framasono Stromboli proponon, ke la venonta kongreso de Esperantistoj estu proklamita kongreso de liberpensuloj — verdire de framasonoj — kiu estas aranĝota en Genua. — Esperantismo estas laŭdevene hebrea kaj laboras precipe en intereso de Hebreoj, pri kio la bonulaj katolikaj pastroj eksciis nur nun. Bonan apetiton!

Hebreoframasona plano. „Zemščina“ citas la raportojn de speciala raportisto pri la kongreso esperantista en Kraków kaj tute ĝuste komentas: En ĉiu spiona proceso estis implikiĝintaj Esperantistoj. La proceso de la ŝtatperfidulo staba kapitano Postnikow (la ĉefa kolono de esperantismo en Rusujo) estas okulfrapanta atesto pri tio. La ŝatata bohema gazeto „XX. Věk“ trafe akcentas tiun ĉi flankon de Esperanto, kiun, kiel konate, laŭ mendoj de la Granda Oriento framasona ellasis en la mondon la varsovia hebreo dr. Zamenhof.

La supraj artikoletoj estas tradukitaj el la bohema katolika gazeto „Čech“ (el Aŭgusto 1912), kiu kune kun la alia katolika gazeto en Praha „XX. Věk“ preterlasas neniun okazon por senhonte insulti la „hebreaĉframasonan“ Esperanton. Ni ne konsideras bezona ĉi tie refutadi la naivaĵojn de la nomitaj redakcioj, kiuj ne meritas tiun ĉi lokon. Por la progresemaj ĵurnaloj bohemaj estas tiaj artikoloj bona okazo por informi la publikon pri la vera stato de la esperanta afero, kaj la Esperantistoj bohemaj ne restas en ili ŝuldaj sian respondon.

SEN TITOLO.

Rapideco de aeroplano esprimita en m/sek egalas kvinoblan kvadratradikon de la ŝarĝo, kiu estas konsiderata por ĉiu kv. metro de la porta surfaco. La nombron de la ĉevalfortoj bezonaj por movigi la motoron de flugaparato oni difinas, multiplikante la pezon de la aparato esprimitan en tunoj per kvar kaj la rezultaton multiplikante per la rapideco en m/sek., sekve por ĉiu metro de rapideco en unu sekundo kaj por ĉiu tono de pezo estas bezonaj kvar mekanikaj ĉevaloj. Tiu ĉi metodo de kalkulado povas servi sole kiel proksimumo por bezono de laiko, la konstruistoj kompreneble devas kalkuli laŭ teoriaj konsideroj multe pli precize. Ekz. aeroplano de Farman kiu kun plena ŝarĝo pezas 650 kg kaj havas la portan surfacon 55 kv. metrojn, havas rapidecon proksimume 60 km en unu horo kaj bezonas motoron de 45 HP. (Z revue „Technika XX. století“ Praha-Kr. Vinohrady. II. roč. č. 7. Žádejte ukázkové číslo!).

Ĉu la informo de fremdlando per Esperanto havas signifon?

Antaŭ nelonge eldonita gvidfolio tra Praha enhavas krom aliaj statistikaj ciferoj ankaŭ la nombron de Germanoj en Praha laŭ la plej novaj datoj: 5·94%. Unu el la germanaj esp. gazetoj aludas nian „belan kaj enhavoriĉan“ gvidfolion kaj la recenzinto notas kun miro, ke, kiam li ne estis Esperantisto, li konis tiun ĉi urbon sole laŭ la bona germana nomo Prag. Per tiu ĉi informa folio li ekscias, ke nur 5·94% de la loĝantaro estas germana. „Nun mi sekve ne scias, ĉu mi konservu tion, kion mi pli frue sciis pri la germana urbo Prag aŭ ĉu mi akceptu ĉi tiun novan instruon — mi simple dubas.“ (Ni aldonas sole tiom, ke li akceptu la novan instruon, ĉar la ĝisnunaj instruistoj, kiuj lin iam pri nia urbo informis, aŭ vole aŭ nevole lin erarigis).

La sokolaj festoj alportis al ni okazon kunveni kun samideanoj, kiuj estis pri tiu ĉi manifestacio informataj per la esperantaj propagandiloj, kiujn la organiza komitato eldonis. Inter la oficialaj gastoj de Praha ni salutis ankaŭ s-on **Harrison Hill** el Londono, vicprezidanton de la Brita Esp. Asocio, kiun ni dankas por la interveno ĉe la bone memorata vizito de la londona urbestro ĉe ni la pasintan jaron. Sinjoro Hill diris al ni, ke same kiel multaj aliaj, li ekscios pri la ekzisto de Sokol kaj pri la festo sole danke la esperantan propagandilon. Vizitinte nin en nia kancelario, li esprimis bedaŭron, ke li ne povis pro oficiala divido de sia programo viziti ĉiujn samideanoj dum iliaj kunvenoj sed ke li sendas al ĉiuj la plej sinceran saluton kaj dankon por la poŝtkartoj, kiujn li estis dum sia restado en Praha de ili ricevinta.

Defendu la veron!

Inter la tagojn de entuziasmo intermiksiĝis nuba momento dum la manifestacia marŝo de tridekmilkapa aro da Sokoloj en uniformoj, salutataj de centmiloj da publiko okupinta ĝis la limo de ebleco ĉiun liberan lokon sur la stratoj kaj placoj. En tiu ĉi momento eble tridek politikaj fanatikuloj el la germana studenta junularo provis trapenetri la premegiĝantan spaliron kaj la vicojn de Sokoloj, postulante lokon por — sia promenado. Oni tamen devis sperti la antaŭviditan provokacion de la germanaj „burŝoj“

klopodintaj nepre eldevigi por si aspekton de kompatindaj martiroj: eble trideko da „kolorornamitaj burŝoj“ ĉirkaŭkurinte el malantaŭa pordo de sia domo unu straton, ekatakis la amasegon da popolo sur la ĉefa strato, kuraĝigitaj de la alta celo — „defendi la germanan (6%) aspekton“ de la bohema Praha. Kelke da policistoj kun helpo de la Sokoloj-komitatanoj baldaŭ sukcesis sen tumulto apartigi ilin de la homamaso, tra kiu ili perforte volis trapenetri, kaj laŭ polica ordono ili poste devis reveni en sian domon. Sed tiu ĉi absolute ignorata kaj cetere atendata provokacio sufiĉis, ke jam la saman tagon estu aperintaj plendoj en la germanaj eĉ fremdlandaj jurnaloj, ke „la Germanoj estis en Praha de la Sokoloj masakritaj kaj preskaŭ mortigataj“. Kaj tamen eĉ ne unu el la ĉeestintaj rigardantoj (inter kiuj estis multaj gastoj el Germanujo) vidis ion similan. Ĉiuj admiris la kvietan kaj sole malŝatespriman konduton de la sennombra amasego de la bohema popolo rilate la punindajn arogantaĵojn de tiuj kelkaj politikaj fanatikuloj. La alvoko en ĉiuj bohemaj ĵurnaloj, petintaj konservi ĉiam sinregeman konscion rilate kiun ajn provokacion, estis de ĉiu respektata. Al ĉiuj fremduloj, kiuj en miloj ĉeestis dum tiu ĉi tempo en Praha, estis donita per tiu ĉi konduto de la germana junularo la plej bona okazo vidi kaj konvinkiĝi pri la lokaj rilatoj, kaj kiel ili promesis, ili uzos la propran sperton ankaŭ por tio, ke ili laŭ vero informos pri ĉio sian gazetaron, kiu pli-malpli ofte ĉerpas informojn el la venenaj fontoj de la politikaj incitantoj germanaj. Al siaj samideanoj, kiuj promesis uzi Esperanton kiel helpilon por tiu ĉi servo celanta la defendon de la bona famo de nia urbo, certe kun plezuro servos niaj Esperantistoj bohemaj per justaj informoj — kio cetere estas nia devo!

Pli multe da justeco, kara sinjoro redaktoro!

Laŭ peto de sinjoro J. Schröder, el Wien esprimita per lia letero de la 21. VII. ni konstatas, ke la eldono de la esperanta gvidlibro „Pejzaĝoj en Aŭstrio“ estis afero tute privata inter la tradukinto kaj la ministerio, kiu estis instigita de Esperanto-Unuiĝo Wien. S-o Sch. volas klarigi la mankojn de ni kritikitajn (vidu pĝ. 74.) per tio, ke li ne rajtis (?) traduki el la germana originalo la nomojn de la stratoj en Praha kaj ke li ne rajtis ankaŭ aldoni en la nomaron de la informejoj la adreson de la bohema landa informejo. Nia opinio estas la jena: se en la germana originalo estas la nomoj de la stratoj en la bohema urbo Praha (kiu absolute ne konas iajn germajn nomojn de siaj stratoj) tradukitaj germane, tiam la afero estas oficiala maljustaĵo de la i. r. ministerio kontraŭ nia negermana nacio kaj ĝi neniel servos la fremdulojn. Sed tiun „kutimon“ kaj taktikon, kiun povis kuraĝi la ministerioj antaŭ kelka tempo kontraŭ la negermanaj nacioj en Aŭstrio, ni neniel volas toleri kaj neniel volas aprobi nun, precipe sur la neŭtrala lingva fundamento. La plej evidenta devo de la tradukinto — Esperantisto, estis sin informi en Praha mem, se li ne scias la nomojn kaj se li ne scias pri la ekzisto de la bohema informejo — precipe ĉar li havis niajn servojn je sia dispono. Cetere bonvolu niaj germanaj samideanoj memori, ke ni havas kaŭzojn, pro kiuj ni devas severe gardi nian egalan rajton, ĉar kio ne estas tuj ĉe la unua fojo kategorie forrifuzita, tiu fariĝas ilia kutimo.

Ĉiam estos nia plej alta principo, rilate tiujn ĉi aferojn, la defendo de egala rajto, ĉar — justitia regnorum fundamentum. Tiel ni ankaŭ komprenas la esperantismon.

AHASVERO.

Novelo de Werner Granville-Schmidt, trad. de Kamilla Fürth.

Estis je fino de la tago, je tiu horo, kiam batalas la ombroj kun la sunradioj en la valo, kaj la vesperaj nebuloj fluetas super la akvoj de Adiĝo;*) tiutempe mi estis enirinta en malgrandan kapelon, kiu invitas la migranton apud la Verona vojo al kvieta restado.

Verdnuanca krepusko plenigis la simplan lokon, kaj en la fundo, kontraŭ la pordo, brulis senmove kaj solene kandelo. Dum mia eniro ĝi subite ekflagris, jetante sian tremetantan lumon sur griziĝintan verton de maljunulo, kiu, genustarante en la preĝeja seĝo, kovris sian vizaĝon per la manoj. Kelkfoje febra tremo trakuris lian kadukan korpon; nekomprenebla murmuro de liaj lipoj fariĝis pasa dolorĝemado kaj liaj velkintaj fingroj spasme kuntiriĝis kvazaŭ ĉe la plej profunda animturmento.

Kiu li estas — ĉu homo elportanta gravegan suferon; ĉu vivlaculo, al kiu premo de kulpo fleksis la kapon? Ĉu la muroj flustris la plendantan: „O mea culpa, mea maxima culpa!" **) aŭ ĉu aŭdiĝis la estingiĝanta sono el buŝo de la genuanto?

Ŝajnis al mi, kvazaŭ alportus mia ĉeesto fremdan, teran spiron en la fumantan kandelnubeton, kvazaŭ mi devus, sensone ŝtelforiri kaj lasi sola la preĝanton. Sed returniĝinte al la pordo, mi ekvidis bildon de Kristo, pendantan sur la kalkita muro en kadro malheliĝinta pro antikveco. Tra la koloraj vitrotabuletoj ankoraŭ fojon plene falis lasta brilo de la estingiĝanta taglumo sur la dolorajn trajtojn de la Suferanto de Golgato. Io sur tiu ĉi bildo fikse altiris mian atenton kaj ne lasis min plu libera; eble tio estis kaŭzita de la juneca vizaĝo, kiu tute diferencis de la tradicia modelo, sed eble ankaŭ de la enigme malhelaj okuloj, el kiuj parolis tiom da kortuŝa akuzo, kaj kiajn mi antaŭe neniam rimarkis sur bildo de la Krucumito.

Kiam mi emociita haltis, enpensiĝinta en muta admiro, timigis min en mia meditado trena brueta paŝado sur la mozaika planko, kaj kiam mi instinkte turnis la kapon, staris la fremda preĝanto apud mi; la palverda duonlumo ŝajnigis liajn senenergiajn trajtojn ankoraŭ pli ĉagrenitaj, pli mizeraj, en senordaj tufoj falis la griziĝintaj haroj sur la altan, sulkigitan frunton, kaj el liaj profundaj okulkavoj flamis sentrankvila fajro.

Esplore glitis miaj rigardoj sur la kurbiĝinta staturo de la maljunulo, sur lia disŝirita mantelo, la polvokovritaj sandaloj kaj sur la ostecaj manoj, kiuj tenis longan pilgrimbastonon.

---

*) Rivero en Italujo.

**) Ho, mia kulpo, mia plej granda kulpo.

„Pro kompatemo de la Sankta Virgulino, ne rifuzu al sortobatita senhejmulo malgrandan almozon;“ li petegis per estingiĝanta voĉo kaj etendis postule la dekstran manon.

Seniluziigita mi elprenis moneron el la monujo donante ĝin al li; ĉar la interna voĉo volis kredigi min, ke li estas io alia, eble pli bona ol ano de tiu almozularo, kiu elpetas almozojn apud la sojloj de la Veronaj marmorpreĝejoj. Tamen liaj vortoj interesigis min kaj tial mi demandis: „Kio igas vin, maljunulo, senripoze migri; kio estas via sorto, ke vi ne povas fini trankvile la vesperon de via vivo en rondo de feliĉaj infanoj?“

Dolora, maldolĉa rido vidiĝis sur liaj mallarĝaj lipoj, kaj lia mano montris al la Krucumito.

„Fremdulo, mi fordiboĉis mian partoprenon je ĝojoj sur tiu ĉi mondo, kaj malmulte valoras, paroli pri mi; sed mi bone rimarkis, kiom fikse altiris vian atenton tiu bildo. Jam multaj personoj staris antaŭ tiu ĉi bildo kaj demandis pri la majstro, kiu ĝin kreis; sed lia nomo estas malaperinta kaj forgesita kaj bone estas tiel!“ La maljunulo dum kelkaj minutoj rigardis mediteme la bildon antaŭ ol li daŭrigis per obtuza voĉo: „Mi volas rakonti al vi la historion de la majstro; ĉar sole mi ĝin konas, ĉar — nu, supozu, ĉar mi estis lia bona amiko. Aŭskultu!

„Antaŭ multaj jardekoj mi konis iun viron, tie supre en Verono. De malproksime, el la Brentavalo li devenis, kaj tie li pasigis sian senĝojan junaĝon en malriĉeco. Lia plej arda deziro estis, fariĝi iam granda pentristo, kaj tial kiel junulo li iris kun malpeza koro kaj ankoraŭ pli malpeza monujo al Verono, al la urbo de la noblaj artoj. Tie ĉi sin malkaŝis al li unue la sanktaj misteroj de la arto, tie per avidaj glutkvantoj li sorbis el la eterna fonto la veran entuziasmon por sia profesio kaj ekkono de la belo.

(*Daŭrigo.*)

ESPERANTA MOVADO INTER BOHEMOJ.

Valná hromada Ústředního Svazu Bohema Unie Esperantista konala se v Praze, dne 29. června večer v kanceláři ve Vodičkově ulici za přítomnosti 18 zástupců sdružených spolků a 19 hostí. Schůze byla zahájena místopředsedou Unie p. Ed. Kühnlem, který vzpomenul pětiletého výročí založení našeho ústředí, zmínil se současně o desetiletém jubileu pražského Klubu, nejstaršího esperantského spolku v Čechách a o letošním 25letém jubileu Esperanta. Po schválení protokolu minulé valné hromady přednesl zprávu pokladní p. B. Davídek; ze zprávy vysvitá, že velká většina příjmů, které u porovnání s významem Unie jsou nepatrné a plynou skorem výhradně ze členských příspěvků, musela býti věnována na úhradu schodku 1200 korun z I. Kongresu zaviněného nesvědomitým hospodařením některých tehdejších funkcionářů. Dluh

tento dík obětavosti nynějšího členstva, jest dnes již téměř vyrovnán. Unie sdružovala během tohoto roku 30 spolků, které zaplatily na příspěvcích 219 K 40 h. Spolky, které účty řádně nevyrovnaly, nejsou za členy čítány. Hlavním zdrojem příjmů byly dary, za které pokladník vyslovil šlechetným dárcům vřelý dík jménem Unie. Revisoři účtů p. Pohl z Plzně a p. Šilhart z Nymburka shledali účty v úplném pořádku a p. Pohl navrhuje, aby p. pokladníkovi bylo uděleno absolutorium. Ze zprávy jednatelské, přednesené panem A. Zahelem, vidno, že agenda Unie se utěšeně rozvíjí, přes to, že její soustavná práce nenalezla dosud všestranného ohlasu, ale naopak, že ještě má co činiti s překážkami, úmyslně několika protivníky v cestu stavěnými, kteří, bohužel, k této svojí činnosti nalezli i jakousi oporu v pasivním chování se jisté části naší české veřejnosti esperantské, která vidí v Esperantu pojítko všech bez rozdílu, aniž by vážila mravní hodnotu jeho stoupenců. — O jednotlivých významnějších podnicích Unie během roku bylo postupně na tomto místě referováno. (III. kongres, rakouská konference, zkoušky z Esperanta, návštěva Lord-Mayora v Praze, přípravy ke sletu všesokolskému, publikace a j.). Pan jednatel poukazuje na plodnou součinnost všech členů výboru, který se plnou silou vynasnažil dostáti svým povinnostem nejen pokud se týče agendy vnitřní, ale i práce propagační. Zprávy funkcionářů byly schváleny a členům výboru byly vysloveny díky. — Výsledek voleb, které provedeny akklamací jednohlasně, zaručuje, že i na dále bude Unie pokračovati stejným krokem za vytčeným cílem. Byli zvoleni: předsedou p. školní rada prof. Dr. V. Rosický, místopředsedou p. Ed. Kühnl, jednateli p. Fr. Dus a Jos. Pech, pokladníkem p. Boh. Davídek, účetní sl. M. Dundrová, náhradníky p. Ing. Fr. Kühnl, A. Zahel a V. Procházka, revisory páni J. Pohl a Jos. Šilhart, náhradní revisor p. odb. uč. J. Jelínek. — K návrhu výboru byli podle práva obsaženého v nově schválených stanovách zvoleni za čestné členy pp. školní rada prof. Dr. V. Rosický a Sir Thomas Vezey Strong, býv. Lord-Mayor londýnský a usneseno věnovati jim umělecky provedené diplomy (viz str. 97.). — Panu H. Hillovi, o jehož ochotném sprostředkování informací pro Lord-Mayora jsme psali již loňského roku a který právě dlel v Praze, usneseno podati projev díků za tyto služby a požádati jej, aby jako místopředseda Britského Svazu Esperantského podal Siru Th. V. Strongovi zprávu o jeho zvolení čestným členem. — V otázce světové organisace esperantské usneseno připojiti se ku prohlášení Britského Svazu a vyčkati definitivního rozhodnutí krakovského kongresu. — Pan K. Procházka doporučuje na základě nabytých zkušeností, aby „zkušební řád“ byl zrevidován a aby bylo bráno přísnější měřítko hlavně při zkouškách vyšších. Veškeré návrhy byly jednohlasně schváleny a doslovem předsedajícího byla valná hromada skončena.

Do knihovny Svazu „Ligo de Bohemaj Esperantistoj“ byly přijaty následující knihy (viz seznamy v roč. III., IV., V. a VI.):
č. 96. Lesage - Bosquet: ***Gil Blas de Santillana*** (76 pĝ.);
č. 97. Byron - Dr. V. da Silva: ***Parisina*** (21 pĝ.);
č. 98. Era: ***Raporto pri la VII. kongreso*** (62 pĝ.);
č. 99. N. V. Gogol - Frenkel: ***Maja nokto*** (85 pĝ.);
č. 100. Schnitzler - Schröder: ***La verda kakatuo***; Unuakta groteskajo (66 pĝ.);
č. 101. ***La Revuo 1911—1912*** (580 + 192 pĝ.);

č. 102. Bibl. de „Danubo": Turgeněv - Dr. Fišer: *Fantomoj* (48 pĝ.), Deškin: *Versajoj* (32 pĝ.):
č. 103. S. Martos - Anatol Koh: *Deziro de diakono* (16 pĝ.);
č. 104. De st. Marcq - A. Stas: *Resumo de la kurso pri teologio* (32 pĝ.);
č. 105. Tom Gallon - A. Wilson: *Tatterley* (198 pĝ.);
č. 106. Tutmonda bibl. je la memoro de Tolstoj. (Trad. Ŝarapov, Kabanov.) 1. *Dio — unu por ĉiuj*. 2. *Unu animo en ĉiuj*. 3. *Unua ŝtupo*. 4. *Per kio homoj estas vivaj*. 5. *Dio vidas veron, sed ne baldaŭ diras*. 6. *Du maljunuloj*. 7. *Kie estas amo, tie estas Dio*. 8. *Sieĝo de Sebastopolo*. 9. *Kaŭkaza militkaptito*. (287 pĝ.);
č. 107. „Int. Mondliteraturo". J. Mondester - L. E. Meier: *Kvin Noveloj* (257 pĝ.);
č. 108. Dr. L. L. Zamenhof: *La Biblio*; *Levidoj*. III. Libro (71 pĝ.);
č. 109. *Pejzaĝoj en Aŭstrio* (117 pĝ.);
č. 110. *La novaj fervojoj tra aŭstriaj Alpoj* (74 pĝ.);
č. 111. E. Privat: *Karlo* (35 pĝ.);
č. 112. E. Privat: *Historio de la lingvo Esperanto* (54 pĝ.).

Knihy jsou zasílány členům Svazu na požádání za náhradu poštovného. Roční členský příspěvek 4 K. (Časopis a odznak dostávají členové zdarma.) Adresujte redakci Č. Č. E. Praha II., Dittrichova ul. 7.

* *

Nekrologo. La 20. de julio 1912 forlasis nin por eterne unu el la plej maljunaj samideanoj kaj ŝatataj amikoj, sinjoro **Jan Hofman**, em. supera inĝeniero kaj konstruisto. Kvankam 75jara, tamen li vigle interesiĝis pri nia movado. ĝojis pri ĉiuj sukcesoj de nia afero kaj laŭ ebleco ankaŭ partoprenis niajn laborojn; estinte dum unu jaro prezidanto de Esp. Klubo en Praha, poste membro de la klubo en Smíchov, li altiris simpation de ĉiuj, kiuj lin konis. Ni perdas en li ne sole samideanon. sed ankaŭ konsilanton, kies foreston ni ofte sentos. Restu en honora memoro la nomo de tiu ĉi estiminda samideano. kiu sian tutan vivon plenigis per laboro kaj viva amo al ĉiuj, inter kiuj li naskiĝis, vivis kaj mortis.

IOM DA INSTRUO.

(*Přeložte.*) I. Velmi hluchý člověk, který popíral svoji chorobu, potkal kdysi na ulici přítele, kráčejícího na druhém chodníku. Tento chtěl se pobaviti na jeho účet a dal mu prstem znamení, aby dal pozor. Přiloživ pak obě ruce ke tvářím, otevřel několikráte dokořán ústa, jakoby křičel ze všech sil, ačkoliv nepronesl ani slova. Tím počínáním přivolal k sobě hluchého, který, udýchán, zvolal: „Proč tak křičíte? Myslíte snad, že jsem hluchý?"

II. V téže ulici bydleli tři krejčí. První, aby na svoji firmu upozornil, vyvěsil nad svým závodem nápis: Nejlepší krejčí v celém městě. Druhý, vida, že jeho soused získává stále rostoucí počet zákazníků, vyvěsil nápis: Nejlepší krejčí na celé zeměkouli. Třetí dosáhl však největší reklamy skromným nápisem: Nejlepší krejčí v této ulici.

La reĝo kaj la saĝuloj.

Unu reĝo venigis ses plej saĝajn virojn de sia lando kaj ordonis al ili, ke ĉiu prezentu demandon, kiun la dua respondu

kaj je tiu ĉi respondo la demandinto donu ankoraŭ pli spritan respondon. Kiu ĉe tio montros plej multe da sprito, tiun la reĝo volis elekti sia konsilanto. La unua saĝulo demandis, kio estas pli peza ol la tero. La dua respondis: Kolero de la homoj. Ne, diris la unua, kolero de Dio. La dua demandis, kio estas en la mondo la plej bona. Bona amiko, respondis la unua. Bona konscienco estas ankoraŭ pli bona, korektis la demandinto. La tria demandis, kiu estas la plej saĝa. Tiu, kiu tralegis plej multe da libroj. Ne, la plej saĝa estas tiu, kiu tralegis sole du librojn: La Biblion kaj la libron de la naturo. La kvara demandis, kiu estas la plej riĉa. Kiu havas plej multe da oro. Ne. sed tiu, kiu plej malmulte bezonas. La kvina: En kio bazas la plej granda honoro? En kuraĝo kaj scio. Ne, sed en humileco kaj pacamo. La lasta demandis, kio estas la plej granda arto? Regi la popolon. Ne, sed regi sin mem. La reĝo laŭdis ĉiujn, sed precipe la lastan, ĉar li komprenis, ke efektive la sinregado estas la plej granda arto kaj li nomis la lastan saĝulon sia konsilanto.

Tri muŝoj. Senzorge,[1]) gaje flirtadis tri muŝoj en butiko de spicvendisto.[2]) Ili vigle zumis, ĝoje ili ĝuis la vivon,[3]) ili pri nenio suferis ja mankojn.[4]) Jen ili malsatiĝis; oni devis tagmanĝi. Ĉiu el ili laŭ sia gusto volis elekti bonan manĝaĵon . . . La unua surflugis[5]) sur farunon, ĝi satiĝis, sed ho ve. ĝi mortis post kelkaj minutoj. Ĉar la faruno estis falsita. La dua surflugis sur konfitaĵon.[6]) Ĝi satiĝis, sed ho ve, ĝi mortis post kelkaj minutoj, ĉar la konfitaĵo estis falsita. La tria surflugis sur muŝmortigilon;[7]) ĝi satiĝis kaj poste vigle, kontente forflugis. Ĉar ankaŭ la muŝmortigilo estis falsita.[8]) (El „Juna Esperantisto“.)

[1]) *Bezstarostně.* — [2]) *Prodavač koření, kupec.* — [3]) *Těšily se ze života, užívaly života.* — [4]) *Vždyť v ničem netrpěly nedostatkem* — [5]) *Vletěla na.* — [6]) *Zavařeninu.* — [7]) Muŝ-mort-ig-il-o *prostředek k zabíjení much, t. j. jed na mouchy.* — [8]) Falsa *falešný*; falsita *falšovaný.*

KORESPONDANTOJ: *93. S-o Fr. Rohrig, *Frankfurt a. M.* Schulstr. 48 (dez. kor. per. il. k. kaj let. pri la esp. movado.) — *94. F-ino B. V. Becker, studentino, 630. 11th str. N. E. *Washington* D. C. Usono, (il. k.; tuj resp.). — *95. S-o D. M. Mc Donald stud., 51. Morning str. *Portland* M. E. Usono (il. k., ĉiam resp.). — *96. S-o Pere Domenech, Topete 119, *Terrassa*, Hispanujo. — *97. S-o Salvador Barris, Era de Dalt 26. *Terrassa*, Hispanujo. — *98—102. S-o Marco Alipio Hernàndez, s-o José Celio Comas, s-o Juan de Jesus Sánchez, s-o Daniel E. Duran, s-o Luis Fran cr. Estrada; komuna adreso: *Cúcuta-Kolombio*, Suda Ameriko. — *103. F-inoj Merce Buxader kaj Eularia Montserrat, *Terrassa*, str. Iglesia 8. Hispanujo (il. k.). — *104. S-o Simon Ukrtiĉjan, instruisto de armena lernejo en *Batum*, Kaŭkazo. Ruslando. (Int. artistajn il. k. de skulptistoj kaj pentristoj bohemaj. Publikigos en la armenaj gazetoj artikolojn trad. el Esp. pri la bohema nacio; pri ĝia historio, literaturo, arto, muziko, teatro, Ústř. Matice Školská, la minoritoj, Sokol ktp.). — *105. S-o G. Chauveau 52. rue Parcheminerie, *Angers*, France. (Dez. kor. serioze per leteroj; ĉiam resp., plej malfrue post 15 tagoj.) — *106. S-o Dudley C. Brooks, Honeoye Falls, *New York*. U. S. A.

Ne dez. plu kor. s-o Harry Wood, en *Durban*, Natal. S. Afriko pro la multaj ricevitaj korespondaĵoj.

Během prázdnin časopis nevychází. Návštěva krakovského kongresu, Všesokolský slet v Praze, tisk III. vydání učebnice a korrektury slovníku znemožnily, aby toto číslo vyšlo před prázdninami. Pro nedostatek místa bylo nutno mnoho látky odložiti do čísla příštího.

Náš posudek v „Národním Obzoru" 5. IV. 12. o esperantském průvodci po Rakousku, v němž vytkli jsme snahu autorů tohoto jinak velmi vkusně vydaného dílka, představiti světu Prahu pokud lze v rouše německém a pomíjeti při tom nás Čechy, dal podnět k denuncování nás tomu, kdo za každých okolností a dle svého slibu všemi prostředky pracuje na znehodnocení všeho, co s naší strany se koná; ba i co jako náš názor se pronese, není jisto před jeho zlomyslnou „kritikou"! Ve svém článku v „Českém Esperantistovi" podkládá nám úmysl popouzeti českou veřejnost proti německým Esperantistům č e s k o u zprávou v časopise určeném široké veřejnosti, kam prý podobná kritika nepatří. Pouze česky psali jsme prý proto, abychom před Němci zdáli se býti nevinnými! Nepovažujeme pisatele zprávy té vůbec za hodna jakékoliv polemiky a proto ignorovali jsme jeho útok stejně jako nesčetné ostatní, jsouce přesvědčeni, že každý prohlédne cíl jeho jednání. — Věci však uznal za nutno chopiti se pan dr. Schulhof, red. esp. rubriky v „Osvětě Lidu" v Pardubicích a zvláštním článkem projevil souhlas s uveřejňováním i zpráv týkajících se podobných událostí z vnitřního života esperantského. Tento jeho článek (samozřejmě!) vyvolal odpověď red. „Č. E." p. Bšk., které p. dr. Sch. věnoval celou dvousloupcovou rubriku v „Osvětě Lidu" dne 6. VII., ačkoliv tato odpověď obsahovala křiklavé nepravdy, o jichž bezpodstatnosti pan dr. Sch. se mohl velmi snadno přesvědčiti — kdyby totiž byl četl náš „Čas. Čes. Esperantistů".

T o h o on ovšem, jak nám nedávno písemně sdělil, neodebírá ani nečte a tím ospravedlňuje svoje povrchní, při tom však mentorské stanovisko. Kdyby byl totiž náš „Č. Č. E." četl (viz str. 74) — což jest ostatně povinností toho, kdo staví se v popředí hnutí a dokonce považuje se za nejpovolanějšího, nade vše povýšeného kritika — byl by viděl, že stejný článek byl e s p e r a n t s k y otištěn v rubrice Bibliografio, kam patří (či patří recense o knihách jinam?; do Biografie, jak pan dr. Sch. ve svém dopise i v „Osvětě Lidu" píše, rozhodně ne). Pan dr. Sch., byv naším dopisem upozorněn na nevysvětlitelnou povrchnost, s jakou odvažuje se informovati čtenářstvo o věcech, jichž nezná a jak dává na jevo, ani znáti nechce, pokouší se v „O. L." (20. VII.) znovu navázati na „inkrimovaný" (jím použitý výraz) článek, při čemž n e t a k t n o s t (při nejmenším) vůči nám, Čechům, která jedině byla námi po zásluze vytčena, nazývá — nešikovností. — Chce p. dr. Sch. všechna podobná přezírání se strany Němců vůči nám považovati za pouhou „nešikovnost"? My ne. V závěrku svého článku nedovede si odepříti úlohu nezvaného advokáta-smírce a

projevuje mínění, že nedělí-li nás od osob, které jsme vyloučili a s nimiž žádných styků n i k d y j i ž míti nechceme, nic jiného, než podobné „maličkosti“, pak že spojení obou organisací (!) bude v nedaleké době docíleno. Poznamenáváme: 1. Za „maličkosti“ nemůžeme jako čestní lidé považovati události, které byly příčinou vyloučení těch, kteří nyní říkají si organisace a jimž přihlásily se do 1. VII. 12. (podle jejich officielní zprávy) celkem — 72 zaplativší osoby, nevědoucí ze značné části, jak měli jsme příležitost tolikráte se přesvědčiti, že stali se zbraní v rukou nesvědomitých agitátorů. 2. Nazýváte dnes, pane doktore, „maličkostí“ událost, které však věnoval jste tolik místa v „O. L.“, jak vidno, jen proto, abyste na sebe upozornil a abyste vyvolával polemiky, při čemž však o faktech, které věci znalí „maličkostmi“ nikdy nenazvali, informací vůbec nikdy jste nehledal. Jsou pro Vás „maličkostmi“ nezřízené útoky a hrubé urážky v každém čísle „Českého Esperantisty“, kterýžto způsob psaní dosud jste neuznal za hodný výtky a snad i mlčením schvalujete? — Nepolemisujeme. Věnujeme čas i místo v časopisech positivní práci pro Esperanto. Doporučujeme činiti taktéž.

Eldonanto: Ed. Kühnl. – Presejo de Národní tiskárna a nakladatelství, společnost s r. o. v Praze.